

INTERNACIA FERVOJISTO



ORGANO DE I.F.E.F.

INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-FEDERACIO

26-a jaro SEPTEMBRO-OKTOBRO-NOVEMBRO-DECEMBRO 1974 N-ro 5



La Z-7001 — Nova franca materialo
Rapideco : 300 km po horo

Kliŝo S.N.C.F.

LA VOJO DE IFEF

IFEF estas faka federacio, kies celoj estas fiksita en § 2 de la statuto. La federacio kaj ĝiaj landaj asocioj havas kaj flegas multnombrajn kontaktojn al aliaj organizaĵoj, al sindikatoj kaj fervojaj kompanioj. Same gravaj estas la rilatoj al la Internacia Federacio de kulturflerantaj Fervojistoj (FISAIC) resp al ties landaj asocioj. Por trovi ĉiam ĝustan vojon en ĉiuj tiuj rilatoj, § 3 de la statuto postulas neŭtralecon laŭ ĉiuj vidpunktoj. Tio garantias mezan linion koncerne al ĉiuj aliaj kontaktoj kaj same garantias reciproke respekton.

IFEF estas « aliĝinta faka asocio » de Universala Esperanto Asocio UEA. Ties komitato en la 59a Universala Kongreso elektis novan estraron. An-

taŭaj internaj disputoj, kiuj daŭris ankaŭ dum la UK mem, havis la konsekvencon, ke la longjara prezidanto de UEA, prof. d-ro Lapenna kaj aliaj meritplenaj gvidaj personoj de la movado ekis kaj forlasis la movadon. Ne estas nia tasko, priuĝi tiujn aferojn, kiuj estas bedaŭrindaj. Sed estas nia afero deklari, ke IFEF daŭrigos sian vojon de strikta neŭtraleco. Tio ne kaŭzos komplikojn, se la vortoj de la nova UEA-prezidanto, d-ro Humphrey Tonkin, kiujn li trovis pri neŭtraleco en la fermo de la UK, ne nur karakterizas la estontan vojon de UEA, sed ankaŭ certigos ĝin.

Joachim Giessner,
Prezidanto.

GRAVAJ ENHAVAĴOJ

	paĝo		paĝo
LA VOJO DE IFEF	62	RESUMO DE FAKPRELEGO	67-68
27a IFEF-KONGRESO	63	IFES - 75	69
ADMINISTRAJ INFORMOJ ..	64	INFORMOJ EL LA IFEF-SEK- CIOJ	70-71
JUNULARA ANGULO	65	EUROPA FERIOSEMAJNO ..	72
59a UNIVERSALA KONGRESO EN HAMBURGO	66	NEKROLOGO	75-76

INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO - FEDERACIO

Sekretariejo : E. Kruse, D-6 Frankfurt (M)74, Wienerstrasse — 121, GERMANIO
Redaktoro : Guy Delaquaize, 52, rue L.-Gandillet, 78420 Carrières/Seine, FRANCIO
Bankkonto : Provinsbanken — DK 9800 — Hjørring — DANIO



LKK-27-a IFEF-Kongreso

Informservo komunikas :

27-a KONGRESO DE IFEF en VILLACH - AŬSTRIO

10-a ĝis 16-a de majo 1975

Kongresejo : KONGRESSHAUS —
VILLACH (A-9500)

Konstanta adreso : 27-a IFEF-Kongreso, Schliessfach 117, A-1103 Wien.
Bankkonto : SPARDA VILLACH, Bahnhofplatz 4, A-9500 VILLACH, Konto nr. 090-060, 27-a Esperanto Kongreso de IFEF.

Kongresa kotizo :

- ĝis 31-1-75 -	1.2-14.4.75
a) Kongresano : aŭ. \$ 260	aŭ. \$ - 320
b) Familianoj, pensiuloj, junuloj ĝis 20-j	130 - - 160
c) Simpatianto	60 - - 60
(ricevos Kongresaĵojn)	

LOKA KONGRESA KOMITATO (LKK) :

prez. : ing. Walter HUBER - Wien ;
vicprez. : ing. Egon PAWLIK - Villach ;
sekr. : ing. Wilhelm HERMANN - Wien ;
Kas. : Rudolf ZANKO - Wien ;
pluaj LKK-anoj : Hans BÜRGER - Linz ;
Johann GEROLDINGER - Linz ;
Greta GÖSSL - Linz, Ernst QUIETENSKY - Wien ;
Josef SCHALLAUN - Wien ;
Franz SCHARF - Wien ;
Martin STUPPNIG - Arnoldstein ;
fakprelego : dip. ing. Friedrich TSCHOM - Linz ;
kaj diverslokaj kunlaborantoj (publikotaj).

PROVIZORA PROGRAMO :

vendredo 9/5 :

gazetara kunveno, malfermo de eks-

pozicio, kunveno de la IFEF-estraro kaj LKK.

sabato 10/5 :

akcepto de la kongresanoj, malfermo de la kongresejo, interkona vespero.

dimanĉo 11/5 :

dioservo, solena malfermo, fotado, duontaga ekskurso al Dobratsch - Villach-a montaro, folkloro vespero.

lundo 12/5 :

estraro-komitato-kunsido (ne publika), internacia balo.

mardo 13/5 :

komisionaj kunsidoj, fakprelego, arta vespero.

merkredo 14/5 :

estraro-komitato-kunsido (publika), duontaga ekskurso al Trilanda Angulo, vespere sen programo.

ĵaŭdo 15/5 :

plenkunsido, sinjorinaj-junulara programoj, junulara vespero.

vendredo 16/5 :

tutaga ekskurso al Velden (Wörther-lago), Minimundus - Klagenfurt, fermo de la kongreso.

sabato 17/5 :

komuna forveturo al la postkongreso Salzburg.

Programaj ŝanĝoj rezervitaj! Ne prokrastu - tuj aliĝu! LKK dankas!

IFEF - POSTKONGRESO en SALZBURG - AŬSTRIO

17-a ĝis 19-a de majo 1975

Konstanta adreso : s-ro Anton HUBER, Minnesheimstrasse 17, A-5023 Salzburg/Gnigl, Aŭstrio.

Bankkonto : Salzburger Sparkasse, Alter Markt 3, A-5010 Salzburg, Konto nr. 311.783-5 österr. Eisenbahner Esperantisten Verband - Sbg.

Kongreskotizo : aŭ. \$ 150,- la paginto de la kotizo rajtas partopreni ĉiujn aranĝojn laŭ la programo sen plua pago.

Provizora programo : rigardado de la naskiĝurbo de Mozart, vizito de koncerto, ekskurso kaj amuza vespero.

JOH. GEROLDINGER.

ADMINISTRAJ INFORMOJ

1. — a) Pro la elekto de la komitatoj G. Delaquaize kaj H. Hauge kiel novaj IFEF-estraranoj necesas kompletigo de la IFEF-komitato. Bonvolu noti la nomojn de la novaj komitatoj :

Danio : G. Thuesen, Langekaervej 40, DK-2750-Ballerup.

Francio : R. Coyac, 7, rue Hoche, F-78500-Sartrouville.

La landaj asocioj bonvolu atenti, ke la mandato de la nun oficantaj komitatoj finos kun la 31-a de decembro 1974 kaj ke pro tio necesos ĝis tiu dato elekti kaj komuniki al la ĉefkomitatano la nomojn de la komitatoj por la oficperiodo 1975-1976.

b) La Junulara Sekcio de IFEF elektis en Tarragona novan gvidantaron. Bonvolu noti la nomon kaj adreson : Fino Mirella MERLANI, Via Giovanni Verga 69, I-00137-Roma (Italio).

La ĉefkomitatano.

2. — Bonvolu noti :

— ke la sekretariino ŝanĝis la loĝe-

jon. La nuna adreso estas : E. Kruse, D 6 Frankfurt/Main 74, Wiener Strasse 121 - Tel. 0611/65 73 65.

— la nun validan adreson por la landa asocio en Bulgario : Bulgara Fervojista Esperanto-Sekcio, Sofia (Bulgario) Poŝtfako 350.

— ke la gvidadon de la brita landa asocio transprenis

P.N. Harvey, 51 Morrison Avenue, Stevenson K 20 4 HH AYRSHIRE/Skotlando.

kaj komitatano estas :

Frank Curtis, Tredworth Road, Gloucester G L1 4 PY/Britio

3. — La kasisto ricevis novajn sumojn por la « japana fonduso ».

Al ĉiuj donacintoj ni kore dankas.

Se ankaŭ vi volas kontribui al tiu ĉi fonduso, bonvolu ĝiri vian monon al la Konto de IFEF — Provinsbank — DK 9800 - Hjörning-Konto-numero : 8353-35055-0.

Ankaŭ la plej malgranda donaco estas bonvena.

IFEF - FAMILIO

Al la familio Lani en Plzen (Ĉeĥoslovakio) ni direktas koran gratulon pro naskiĝo de ilia dua infano. Ni

salutas la filineton

Andrea

kaj deziras al ŝi prosperan kreskadon.

LA VOĈO DE LA REDAKTORO

Jen IF 5, la 3-a bulteno kiun mi prezentas al vi, de post nia kongreso en Tarragona. Pri la 2 antaŭaj, vi certe faris rimarkojn kaj kritikojn (tamen, nur malmultaj legintoj skribis...):

Vi vidis ke :

— la 1-a bulteno (IF 3) havis pli malgrandan formaton; tio estis pro miskompreno kun la presejo, kiu ne uzis, antaŭe, la eŭropan formaton A 5.

— la 2-a bulteno (IF 4) havis la ku-

timan aspekton, sed nur 12 paĝojn; la kaŭzo estis la jena : la eldono devis esti iom pli frua ol antaŭe, ĉar la presejo libertempas dum la tuta monato Aŭgusto (franca tradicio) kaj, pro tio, mankis la materialo.

La nuna bulteno (IF 5), fine, estas tute normala; sed.. ĝi estas la lasta por la jaro 1974. La kaŭzo estas financa, ĉar la kosto de la presado estas iom pli alta en Francio ol en Norvegio; kaj, por respekti la buĝe-

ton, ni decidis fari nur 5 bultenojn anstataŭ 6, pojare. Bedaŭrinda, sed ŝaĝa decido.

En 1975, vi do ricevos 5 bultenojn kun 16 (kaj eble 20) paĝoj.

La datoj, ĝis kiam vi povos sendi artikolojn, estas :

IF 1 : 20-a de januaro

IF 2 : 15-a de marto

IF 3 : 20-a de junio

IF 4 : 5-a de septembro

IF 5 : 5-a de novembro

Tiujn datojn vi retrovos en ĉiu bulteno, sub la titolo : « Redaktfino ».

Koncerne la envahon, mi deziras rimarkigi al vi la jenon :

— Pres-erarojn mi promesas for-ĉasi sen-kompate, ĝis kompleta malapero...

— La enhavon mi ŝatus ankoraŭ pli-bonigi, kun via helpo.

Mi dankas ĉiujn, kiuj sendis al mi artikolojn. Sed ĉu vi kredas ke estus interese, se ĉiu sekcio de IFEF povus havi lokon, sia-vice, en nia bulteno?

Tiu loko povus esti rezervita por iu teksto, kompreneble; sed se vi ne havas tekston, sendu almenaŭ foton... ekzemple foton pri fervoja temo (moderna materialo, nova stacidomo, aŭ alia interesa teknikaĵo de la naciaj fervojoj...), kun kelkaj klarigaj linioj.

Vidu la hodiaŭan front-paĝon : ĝi prezentas francan lokomotivon. Tio estas nur ekzemplo; ĉu, venontfoje, unu el la 19 aliaj sekcioj povus proponi ion?

IF devas esti la afero de ni ĉiuj, fervojistoj...

Antaŭan dankon.

La Redaktoro.

JUNULARA ANGULO



pliampleksigi la rilatojn kun aliaj junularaj ne-esperantistaj organizaĵoj, organizante Esperanto-kursojn kaj klopodante plue disvastigi nian lingvon inter la gejunuloj.

Mi sugestas, ke ĉiu junulo sendu leteron aŭ artikolon al sia nacia fervojista revuo, por ke la redaktoroj kaj legantoj konstata la intereson, kiun Esperanto vekas ankaŭ ĉe la junaj fervojistoj, kiuj legas la revuon.

Samtempe, ni zorgu konservi la internacian junularan etoson en niaj kunvenoj, en niaj skio-semajnoj kaj kongresoj, kaj ankaŭ en ĉiuj aliaj kunvenoj.

Ĝis revido, do, se ne antaŭe, en Plan Val Gardena, Italio, por la 16-a Internacia Fervojista Esperanto — Skio-semajno, okazonta de la 15-a ĝis la 22-a de februaro 1975.

Mi bezonas la kunlaboron de vi ĉiuj!

Mirella MERLANI

Via Giovanni Verga 69 -

I - 00137 - ROMA - Italio.

IFEF - JUNULARO

Mi dankas ĉiujn kongresanojn pro mia elekto en Tarragona kiel gvidantino de la fervojista Esperanto-Junularo.

Mi petas ĉiujn niajn gejunulojn laŭeble aktivi en sia lando, precipe por

Germana Federacia Fervojo — DB — en la 59-a Universala Kongreso

La 59-a UK de Esperanto okazis la 26-an de julio ĝis la 3-a de aŭgusto 1974 en Hamburgo (Germanio) kun 1850 partoprenantoj el 50 landoj. En la kadro de la laŭkutima mult-
varia programo okazis la tradicia fervojista **kontaktkunveno** mardon, 30-an de julio en formo de « Fervojista tago — internacia ». Partoprenis ĝin 80 personoj el 16 landoj. GEFA kiel respondeculo preparis belan programon, kiu komenciĝis matene en la granda salono de la fervoja direk-
cio en Hamburgo per akcepto flanke de ties prezidanto Kuno Mohr. Ĉeestis reprezentantoj de la Sociala or-
ganizo BSW kaj de la plej forta fervojista sindikato, kiuj parolis same kiel la prezidanto de Germana Esperanto-Asocio, d-ro Bormann. Sekvis inter-
resa faka prelego de Gernot Ritters-
pach pri novaĵoj de la fervojo, ek-
zemple pri kolortestoj de DB por trovi plej bonvenan eksteraron por la pasaĝervagonoj. Willi Barnickel rememorigis per amatora filmo pri la belega kongreso en Tarragona. Sek-
vis komuna manĝado en agrable si-
tuanta restoracio apud la Elbe-rivero kaj poste kelkhora rondveturado per 2 ŝipetoj tra multaj basenoj de la haveno. Speciala celo estis la kon-
tenara terminalo, kie oni praktike po-
vis observi tion, pri kio i.a. temis la pasintjara fakprelego en Beograd. Ĉiu el la 80 partoprenantoj antaŭe ri-
cevis koncizan priskribon de la ham-
burga haveno kaj sur la ŝipetoj deta-
lan planon de ĝi.

Laŭ peto de LKK la **Germana Fe-
deracia Fervojo** instalas oficialan in-
formejon en la modernega kongresejo,
kies plej granda salono povas akcepti
3000 personojn. Ses membroj de GE-

FA tie deĵoris dum la tuta kongreso kaj donis al la kongresanoj ĉiujn ser-
vojn kutimajn ĉe fervojaj biletdone-
joj. La rezultoj estis pli ol konten-
tigaj. Venditaj estis 320 komunbiletoj
validaj dum 7-8 tagoj por ĉiuj hambur-
gaj trafikiloj, 284 aliaj biletoj, plej
ofte al eksterlando, 183 sidlokojrezer-
viloj, 37 kuŝlokoj, 9 litoj kaj 9 TEE-
suplementoj. Enspezoj 19 000 GM. Kro-
me estis donitaj 2000 horar kaj tarifin-
formoj, ofte tre komplikaj. Centoj da
« Interurbaj Horaroj » kaj varbiloj de
la fervojo estis apude disdonitaj al
la klientoj. Apud la informejo pendis
la oficialaj afiŝoj kun la ekveturtem-
poj de ĉiuj trajnoj kaj koncizaj gra-
vaj informoj, ekstrakte tradukitaj el
la oficiala horaro. Ĉi tiu ĝiĉeto eĉ pli
forte estis frekventita ol simila en la
43-a UK en Mainz. Jen vera tasko por
niaj landaj asocioj aranĝi similan es-
tonte. Ĉu en Kopenhago 1975?? Laŭ
la hamburga ekzemplo la kostoj por
la stando kaj la deĵorantoj estas
pli ol reenspezitaj. Krome la tuta
afero estas bonega reklamo por la
respektiva ŝtata fervojo, ĉar ankaŭ en
la gazetaro aperis artikoloj kaj radio
kaj televido kelkfoje raportis pri tiu
speciala fervoja agado.

En la unua Generala Kunveno de
UEA salutis la fakaj asocioj. Ĉeest-
tis ĝin la prezidanto de IFEF, J.
Giessner, la UEA-komitatano A de
IFEF, d-ro J. Bácskai kaj la ĉef-
komitatano de IFEF, K. Greutert. Sa-
lutis nome de IFEF ties prezidanto.
Li emfazis la fakan agadon de la
fervojistoj esperantistaj kaj la mult-
facetajn interplektojn inter IFEF resp.
ties landaj asocioj unuflanke kaj la
fervojaj kompanioj, ties kulturflekan-
taj organizaĵoj, diverskoloraj sindika-

toj kaj multaj aliaj organizaĵoj alia-
flanke.

La prezidanto krome substrekis la
eminentan valoron de la oficiala repre-
zentado de DB en la kongreso.

Manko de spaco malhelpas skribi
pli pri tiu grava kongreso. Komparu
tamen la gvidartikolon de ĉi tiu nu-
mero.

Giessner.



« Konteneroj al fora Azio sur kon-
tenara ŝipo ĉe kajo en la grandega
kontenera terminalo de la hamburga
haveno. Jen la praktiko de la pro-

blemoj, pri kiuj temis la fakprelego
en la Universala Kongreso de Beo-
grad 1973. »



TEKNIKO

EVOLUADO DE RENFE DUM LA LASTA JARDEKO

Resumo de fakprelego prezentita dum la 26-a IFEF-Kongreso Majo 1974 en Tarragona (Hispanio).
(Vidu IF4 - paĝo 50-57)

1. Fervojlinioj

Kiam postmilite en 1941 estis kreita la Fervoja Nacia Hispana Reto (RENFE) ĝiaj linioj ampleksis 12778 km, kun larĝa ŝpuro de 1676 mm. En la jaro 1963 starigis la Dekjara Projekto por Modernigo (DPM) 1963-1972, kiu i.a. ĉesigis pli ol mil kilometrojn da neprofitdonaj relvojoj. La nun ekspluatata reto ampleksas 13523 km.

2. Renovigo kaj modernigado

La moderniga plano DPM precipe celis la ĉefajn liniojn por plialtigi tie la komercan rapidecon kaj redukti la kostojn por trakkonservado kaj veturilriparo. Oni modernigis pli ol 5 mil kilometrojn da trakoj, kio forprenis 30 % el la financaj rimedoj por la plano. Por atingi, ke la meza aĝo de trako ne superu 20 jarojn, oni devos ĝis 1987 renovigi ĉiujare 500 km.

3. La cirkulanta materialo

25 % el la financaj rimedoj por DPM estis destinitaj por pligrandigi la nombron de disponeblaj sidlokoj en komfortaj pasaĝervagonoj, kaj larĝa gamo da specialaj varvagonoj estis akirita. Elektrotrajnoj kaj dizelaj motortrajnoj kompletigas la oferton de la konvenciaj trajnoj. La tria klaso de pasaĝervagonoj estas ĉesigita, ĉirkaŭ mil lignaj vagonoj eksigitaj kaj anstataŭigitaj. La maksimume permesebla aĝo estonte estu por pa-

saĝervagonoj, 35 jaroj, por elektrotrajnoj 30 jaroj kaj por dizelaj motortrajnoj 25 jaroj.

4. Pasaĝeroj

Proporcie kun la pliboniĝo de la nacia ekonomia stato ankaŭ kreskis dum la jardeko la nombro de transportitaj pasaĝeroj je 15 milionoj kaj tri miliardoj da pasaĝerkilometroj. La enspezoj el la pasaĝertrafiko kreskis je 5 miliardoj da pesetoj, ĝi duobligis.

5. Varoj

La vartrafiko antaŭe stagnanta pliiĝis en la jardeko je 5 milionoj da netaj tunoj kaj 1,8 miliardoj da tunkilometroj. Eĉ pli kreskis la enspezoj je 2,75 miliardoj da pesetoj sekve de tarifplialtigoj.

6. Specialaj transportoj

La unua kontenera trajno (TECO) trafikis 1972 inter Madrido kaj Barcelono, en 1973 oni jam transportis pli ol 30 mil kontenerojn kun neta pezo de 300 mil tunoj kaj 200 milionojn da tunkilometroj.

7. Trakcia materialo

La perkarba vaportrakcio grandskale malaperis dum la jardeko. RENFE akiris 90 elektrajn lokomotivojn, 112 elektrotrajnojn, 270 dizelajn linio-lokomotivojn, 215 dizelajn manovro-lokomotivojn, 19 TALGO trajnoj, 33 TER-trajnojn kaj 125 relaŭtobusojn.

8. Fiksaj instalaĵoj

Elstaris dum la jardeko la inaŭguro de la nova stacio Chamartin ĉe Madrido, la konstruado de pluraj stacioj laŭlonge de la nova relvojo Burgos-Madrid, kaj la renovigo de multaj centraj stacioj. Pri stacioj por vartrajnoj estas menciinda la inaŭguro de manovrejo Vicalvaro.

Sur la sektoro signaliloj kaj telekomunikado oni faris preparojn por centrigita trafikontrolo, instalante komunikilojn por alta frekvenco kaj centrigita selektilo, precipe je la linioj Tarragona-Tortosa kaj Valencia-Sagunto. Koncerne neprofitdonajn liniojn oni celas fermi kaj malinstali grandan nombron da linioj kun negativa bilanco.

Domkonstruaĵoj : Krom stacidomoj, konstruaĵoj por trakkonservado kaj kun socia karaktero estas rimarkinda la inaŭguro de nova oficejdomo kaj la akiro de alia oficejdomo, ambaŭ en Madrido. Ankaŭ centra riparejo estis konstruita.

9. Elektroniko

La enkonduko de elektronika biletvendado en 1968, komence nur por trajnoj ek de Madrido, servas al rapidmoveco kaj modernigo de la vendosistemo : La biletojn inkluzive rezervado de sidloko oni jam du monatojn antaŭe povas akiri. Intertempe la servo etendiĝis al preskaŭ ĉiuj trajnoj kaj ĝi funkcias same ĉe RENFE-oficejoj kaj vojaĝagentejoj. Du pliaj komputeroj ebligis inkluzivigi i.a. la kombino de litvagona bileto kun la vojaĝbileto en unu bileton, kaj la kontrolon de la pasaĝervagona stoko. La enkonduko de plej moderna sekurecsistemo «centra trafikontrolo» (CTC) estas en preparo respektive jam parte okazis sur kelkaj linioj.

10. Organizado pri kontoj kaj administracio

Sekvante la kreskantajn bezonojn oni kreis por asignitaj taskoj novajn departementojn, kunfandis aliajn kaj formulis strategian planon pri la organizado.

11. La projekto RENFE 1972-1975

Ne temas pri simpla daŭrigo de la DPM, tio estas nur eta parto. Precipe ĝi antaŭvidas projekti estontecan fervojon je plej altaj rapidecoj kaj la aplikon de ciberneto al transportproblemoj en grandaj urboj kaj por specialaj vartransportoj.

12. La homo en RENFE

Laŭ la strategia plano RENFE faros diversajn agadojn por disponigi familian helpon kontraŭ riskoj kaj malagrablaĵoj ne inkluditaj aŭ ne sufiĉe konsideritaj de la socia asekuro. Krome oni esploras la enkondukon de kombinita sistemo pri bazaj salajroj kaj stimulpagoj laŭ la evoluado de la vivkostoj. Fine oni cedos kreditojn al fervojistoj por akiri loĝejojn kaj samtempe RENFE mem konstruas familiajn loĝejojn.

13. Profesia klerigado

Oni konsideras ĉiujn kategoriojn de fervojretaj laborantoj kaj ankaŭ novajn aŭ konvertendajn fervojistojn, planas la necesajn instalaĵojn. Plie oni favoros kulturen kelrigon de la laboristoj kaj iliaj familianoj per esceptaj helpoj.

14. La financa situacio

RENFE en 1970 unufoje atingis pozitivan ekspluatbilancon kaj oni esperas en proksima estonteco atingi memfinancadon. RENFE prenis trifoje krediton ĉe la Internacia Banko pri Rekonstruado kaj Progresigo (IBRD) pri entute pli ol 200 milionoj da usonaj dolaroj, la ŝtato donis la necesan garantian.



16-a Internacia Fervojista Esperanto-Skisemajno « I.F.E.S. — 75 »

15-22 februaro 1975 en « CASA ALPINA DEL DOPOLAVORO FERROVIARIO DI BOLOGNA » - PLAN VAL GARDENA (Bolzano) Italio.

Organizas : I.F.E.A., Via Donato Creti, 61 = I-40128 BOLOGNA, Italio.

Poŝtkonto : 8/24094 — Itala Fervojista Esperanto-Asocio « I.F.E.A. » Via Donato Creti, 61 = I-40-128 BOLOGNA, Italio.

Plan Val Gardena situas je la piedoj de la Dolomitoj je alteco de 1600 metroj. Plan estas parto de urbeto Selva Val Gardena. La domo disponigas ĉambrojn je 2, 3, 4 litoj kun duŝo; nur malmultajn unultajn sen duŝo.

Prezo por la tuta restado (kompleta pensio) italaj liroj 40'000.

Sciigo pri eventuala plialtigo de la prezo estos sendota al la aliĝintoj, kiuj tamen ricevos, rekte pliajn informojn.

GENERALAJ INFORMOJ

1) Samtempe kun la aliĝilo sendu nepre italajn lirojn 10'000 po persono kaj po semajno : ĉi tiu sumo ne estas repagebla kaze de nepartopreno. Ni pritraktos nur la aliĝilojn kun tiu ĉi antaŭpago.

2) « Casa Alpina del D.L.F. di Bologna » en Plan Val Gardena, kie okazos la I.F.E.S.-75 estas atingebla per aŭtomobilo.

Fervejo oni devos halti en CHIUSA (km 28 de Plan) aŭ en BOLZANO (km 45) por ekuzi la aŭtobuson kiu veturas al Plan.

3) Ni garantias la rezervigon de la ĉambroj al tiuj kiuj aliĝos ĝis la 1-a de decembro 1974. Ni ne bezonas limigi la kvanton de la gepartoprenontoj, se ili ĝustatempe aliĝos.

4) Kaze ke pro eventuala plialtigo de la prezo iu dezirus malmendi la restadon, li ricevos la pagitan sumon, kondiĉe ke li malmendu antaŭ la 31-a de decembro 1974.

ALIĜILO

Mi aliĝas al 16-a I.F.E.S.—75 = 15-22 Februaro 1975

Familia nomo : S-ro S-ino F-ino

Antaŭnomo :

Strato kaj numero

Poŝta Gvidnumero Urbo

Lando/.....

Mi intencas loĝi kun

en dulta — trilita — kvarlita—ĉambro

Mi intencas alveni je la (tago kaj horo)

per aŭtomobilo per trajno en

Mi deziras resti plian semajnon jes ne (forstreku la nedeziritan)

Samtempe mi sendas la antaŭpagon de italaj liroj 10'000, al

Dato Subskribo

INFORMOJ EL LA IFEF — SEKCIOJ

AŮSTRIO

Linza Esperanto Skisemajno 1975

En Aŭstrio okazos la LES 1975 de 8-a ĝis 15-a de februaro 1975 en Sportalm Strussing apud Bischofshofen. Informoj : Joh. Geroldinger, Strassham 293, A-4072 Alkoven, Aŭstrio.

el J. Geroldinger.

FRANCIO

La Kultura Esperantista Centro en TOURS (Francio) sukcesis konvinki la Turisman Oficejon de tiu urbo eldoni folion en Esperanto, aldone al turisma broŝuro.

La esperantistoj estas petataj rilati en Esperanto dum vizito al la Oficejo aŭ skribi en esperanto al :

OFFICE du tourisme de TOURS - Place de la Gare - 37000 TOURS - Francio.

el A. Aude.

FFEA.

NORVEGIO

Alvoko de Kolego Kolbrek.

Mi estus tre dankema se vi povus sendi al mi kontribuon por « Fervojista Paĝo ». La longeco de la artikoloj aŭ informoj devas laŭ longeco konveni por la « Paĝo » kaj la enhavo kompreneble devas temi pri fervojistaj aferoj, ekzemple pri specialaj modernaj aŭ novaj trajnoj, pri interesaj aŭ amuzaj travivaĵoj, k.t.p.

Mi devas havi la rajton mallongigi la kontribuojn, se necesas, ĉar « Fervojista Paĝo » ne estas granda.

O. Kolbrek.

Kaldbakkstubbén, 22, Oslo 9

SVISIO

La trafikoficejo en ROMANSHORN, urbo kie loĝas nia amiko Walder, eldonis folion kun turismaj informoj en Esperanto.

Mendu ĝin al Verkehrsburo (Trafikoficejo) - Bahnhofplatz - CH 8590 Romanshorn. La oficistino, F-ino Niederhauser, korespondas en Esperanto.

ITALIO

Italaj ŝtataj fervojoj kaj esperanto

RAPORTO PRI LA GAZETARA INTERVUO KAJ PRI LA STANDO ĈE LA FOIRO DE PADOVA

La 17-an de majo 1974, ĉe la sidejo de « Libertempa organizaĵo por fervojistoj » —Dopolavoro Ferroviario— en Padova, aranĝita de vagonarestro Tammone Pasquale, gvidanto de la loka Fervojista Esperanto Grupo « Brento », okazis gazetara konferenco pri la internacia lingvo Esperanto.

Ĉeestis kvardeko da personoj, inter kiuj du eminentaj ĵurnalistoj de du gravaj ĉiutagaj ĵurnaloj, ing.ro PRADELLA estro de fervoja Departemento Venecio, ing.ro Zannini Aldo eksdirektoro, la staciestro de Padova Kav. ro Cecchetti, reprezentantoj de IFEA-grupoj el Venezia, Padova, Treviso kaj Vicenza.

La intervjuato estis direktoro de I.E.I.-Itala Esperanto Instituto-d-ro Karlo Minnaja, kiu post mallonga prelego pri la valoro de Esperanto lingvo, kompetente respondis al demandoj pri la monda E-movado, pri UEA kaj ĝiaj rilatoj kun UNESKO, pri la nuna situacio por enkonduki esperanton en la italajn lernejojn, pri la literaturo originale verkita aŭ tradukita en naciajn lingvojn, pri disvastigo de preskaŭ 200 gazetoj aŭ revuoj esperante eldonitaj.

Minnaja aparte reliefigis la kategorion de fervojistaj esperantistoj kiel unu el la plej elstaraj kaj agemaj fak-asocioj. Krome li raportis ke IFEF alte meritas ĉar en ĝi grupiĝas fervojistoj el 23 ŝtatoj kaj ĉiujare aranĝas internacian kongreson, kiun partoprenas pli ol 700 asocioj.

Post kelke da jaroj estos preta ankaŭ en esperanto la teknika fervoja terminologio kaj oni esperas ke ĝi estos enkondukitita en « lexique général des termes ferroviaires » kiu nun

estas uzata en ses lingvoj ĉe la eŭropaj fervojaj administracioj aliĝintaj al la U.I.C.-«Union internationale des chemins de fer».

Dum la internacia specimenofoiro en Padova, de la 31-a de majo ĝis la 13-a de junio, dank'al la helpo kaj interkonsente kun ŝtataj fervojoj de Venecio, oni aranĝis standon kaj fervojista esperantisto Tammone propagandis nian lingvon. Multe da vizitantoj interesiĝis pri esperanto, kiel valora ilo simpla kaj neŭtrala por plej taŭga interkompreno inter la popoloj ne nur en literaturo sed ankaŭ en komerco kaj industrio.

Fine la nova fervojista esperanto grupo «Brento» (Brenta estas la nomo de rivero kiu trafluas Padova-n) planis akcepti kaj akompani tra la urbo Padova ĉiujn partoprenantojn la SAT-Kongreson, kiu okazos en aŭgusto en la urbo Bergamo.

el IFEA



Italaj ŝtataj fervojoj «FS» kaj esperanto, en la sama stando dum la Internacia Specimena Foiro en Padova.

En la foto estas videblaj la Esperanto-pioniro Prof-ro Giovanni Saggiore kaj nia aktivulo Pasquale Tammone. Danke al ili oni okazigis tiun interesan aranĝon kiu vekis grandan intereson dum la tuta Foiro.

ANONCOJ

Amiko NAWROWSKI, GDYNIA, Hetmanska 20, Polujo, serĉas : «verda Vojo» - n. 1,2,6/1960. la Kongreslibrojn de : Bruselo 1964, Maribor 1971, Aarhus 1973, kaj Tarraĝona 1974. Kiu povus helpi lin?

Sukcesa Esperanto-libro de fervojisto

Jus ni eksciis ke, dum la Universala Esperanto-Kongreso en Hamburgo, furore vendiĝis la nov-speca didaktika legolibro «Amuzaj dialogoj en Esperanto», verkita en simpla lingvo-stilo far nia franca membro A. LIENHARDT (emerita fervoj-inĝeniero en Mulhouse) kaj humore ilustrita far nia pariza membro André FONNET (pseudonime : ARFOLL).

Tiu rekomendinda legolibro, aperinta en la eldona fako de U.E.A. (Rotterdam), ebligas al novaj kaj malnovaj Esperanto-lernantoj agrable kaj sen-pene ekzerci sin en **parola uzo** de nia lingvo. Tial, ĝi estas diskongenda inter kursanoj, grupanoj kaj ĉiuj amikoj de Esperanto,

Franclando - Emeritulino fervojista kiu sekvas la 2-a-grada kurso, deziras korespondi kun amiko (kaj amikino) el Belĝio, Nederlando, Svisujo, Italujo.

S-ino ROSSIGNOL «LE TILLEUL» 61500 TANVILLE.

Sovetio

Gestudentoj de geodezia instituto deziras kolekti ekspozician materialon, do mapojn, atlasojn kaj turismajn prospektojn, eldonitajn en diversaj landoj. Interŝanĝe vi ricevos de Novsibirska regiono atlasojn aŭ similajn eldonaĵojn, laŭ via deziro. Nia adreso : Esperanto-Klubo, Abonkesto 213, 630 099, NOVOSIBIRSK, USSR, Siberio.

EŬROPA FERIOSEMAJNO



Por la 15-a fojo okazis la Eŭropa Feriosemajno aranĝita de la organizintoj s-roj Hunkeler kaj Glättli, sub aŭspicioj de la Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj kaj IFEF. Ĉi-foje ĝi okazis de la 22-a ĝis la 28-a de septembro en Magliaso, dekon da kilometroj for de Lugano. La semajnon ĉeestis 87 personoj el 11 landoj, inter ili eĉ aŭstraliano. El Svislando mem estis 15 personoj.

Kiel loko oni uzis la novan evangelian centron por ferioj kaj klerigo en Magliaso, kuŝanta en bela parko tuj apud brako de la Lugana Lago. La centro konsistas el pluraj domoj por loĝado, el konstruaĵo enhavante kioskon, poŝtofejon, restoracion kaj manĝosalonon. Kompletigis ĝin naĝbazeno kaj ludejo. La varia programo de la feriosemajno do trovis la necesajn adekvatajn ejojn por senĝena evoluo kaj efektivigo. La regionaj radio, televido kaj gazetaro montris grandan intereson al la ferio-centro kaj la feriosemajno.

La programon oni povis dividi en tri

partojn, instruon, ekskursan kaj distran. La instrua parto okazis antaŭtagmeze kaj konsistis el paralelaj diversgradaj lingvo-kursoj kiujn gvidis kompetente s-roj Bächli, Hunkeler kaj Liechti. La grandnombra ĉeesto de la partoprenintoj atestis pri interesaj lecionoj. Posttagmeze okazis la ekskursa parto, kiu kondukis la feriantojn al la konata merkato en Luino, al ŝiprondveturado sur Lugana-lago, al vizito de «Mendrisiotto» kaj «Malcantone» du belegaj tiĉinaj regionoj. La vesperoj estis plenigitaj per variaj distraĵoj kaj amuzaj programoj. La aktiva kulaboro kaj kontribuo de la ĉeestantoj donis al tiuj vesperoj tute apartan atmosferon kaj zorgis por la necesaj reciprokaj kontaktoj. Oni sentis sin en granda familia rondo.

La bona organizado kaj prizorgado, la belaj ekskursoj kaj la harmonia rondo kiu kune akiris belajn memoraĵojn kaj travivaĵojn zorgis por ĉies kontenteco kaj por la al Esperantistoj tiel kara etoso. K. Greutert.

REMEMORAĴOJ

ANTAŬ 65 JAROJ HISTORIO DE LA FERVOJISTA MOVADO

El la « Esperanta dokumentaro de E.C.O. : Kvina Universala Kongreso de Esperanto, Barcelono 5/11 septembro 1909 » (paĝoj 94 k 95).

FERVOJISTOJ :

La unua kunsido okazis la 7-an de septembro 1909 : Ĉeestantoj : 11, inter kiuj 5 francoj : S-roj 'Aussenac, Berlande, Bontemps, Meunier, Robin ; 1 anglo : S-ro Freeman W. Crofts ; 2 germanoj : S-roj Petzold, Engst ; 1 aŭstrianino : S-ro Schwarz ; 1 dano : S-ro Hinrichsen ; 1 ruso : S-ro Sandeck.

Oni elektis kiel prezidanto(n) S-ron Berlande el Villeneuve-Saint-Georges, kaj kiel sekretario(n) S-ron Bontemps el Parennes.

S-ro Berlande dankas la ĉeestantojn kaj sendas koran saluton al nia kara Majstro, D-ro Zamenhof, kies genio permesas al la fervojistoj de malsamaj nacioj kunveni en Barcelono ; li dankas ankaŭ la Komitato de la Va por lia kora akcepto.

Poste, la « Internacia Asocio de la Esperantistaj Fervojistoj » (I.A.E.F.) estas starigita kun la sekvantaj celoj : 1 - propagandi Esperanton de D-ro Zamenhof inter la fervojistoj de ĉiuj landoj,

FERVOJAJ NOVAĴOJ

PORTUGALIO

Nova Simbolo de la Portugalaj Fervojoj.

La fervojoj portugaliaj adoptis tiun novan desegnon por simboli la siglon C.P.

Ĝi simbolas la streĉon de la C.P. pri renovigo.

La Redaktfno por la venonta IF ests 15-1-75

Presejo : Editions Polyglottes
232, rue de Charenton
75012 Paris - Francio

- 2 - starigi specialan profesion vortareton kiu, post ĝia plena ellaboro, estos eldonata de la Asocio,
- 3 - kuraĝigi interŝanĝon de profesiaj ideoj, inter homoj de sama metio, sed de malsama nacio,
- 4 - eldoni ĉiujare adresaron de la esperantistaj fervojistoj,
- 5 - faciligi interŝanĝon de infanoj de fervojistoj dum la libertempoj,
- 6 - kuraĝigi la societanojn ĉeesti la esperantistajn kongresojn, faciligante la vojaĝojn.

A. Blondeaux.

ANTAŬ 15 JAROJ

el « Pola Fervojisto » - Septembro 1959.

« La plej moderna ferdeksipo de malfermita kaj samtempe fermita tipo estas nia nova M/S ZAMENHOF, kiu estis surakvigita la 12/7/59 en la ŝipkonstruejo Brodogradilište en Jugoslavio.

« La ŝipo estas konstruita por la Polaj Oceanaj Linioj, kiuj estas la armatoro. La ekspluatanto estas la komuna navigada pola-ĉina entrepreno Chipolbrok, kiu fondiĝis en la jaro 1951 laŭbaze de farita kontrakto inter la registaroj dela Pola kaj Ĉina Polaj Respublikoj. »

E. Nawrowski.



DANLANDO

La 26.5.74 komenciĝis nova epoko por DSB (Danaj Fervojoj) novaj, modernaj kaj pli komfortaj vagonoj, novaj koloroj, novaj uniformoj kaj nova aspekto kaj tipografio de la horaro.

DEFA kaptis tiun okazon instigi al DSB translokigi la Esperanto-klariĝojn de la granda horaro por la eks-terlanda trafiko.

Ni petas vin sendu al DSB (Vester-

brogade 84 Köbenhavn) dankleterojn kaj montru al via fervoja administracio la horaron por instigi al ili agi simile.

TUTMONDAJ KONGRESOJ

40-a KONGRESO DE NZEA

4-8 Januaro, 1975

Kiel jam anoncote je la 39-a Kongreso, la 40-a okazos en Christchurch. Jen la kontaktadreso :

Loka Kongresa Komitato : P.O. Box 13-213, Armagh, Christchurch — por loĝado kaj administrado.

Konstanta Kongresa Sekretario : S-ro A. Richardson, 54 Smithfield Road, Wanganui — por partopreno en kaj proponoj por la programo.

Plenaj detaloj aperos en « NZE », N-ro 376.

Adreso de NZEA kaj la Redakcio de « NZe » : P.O. Box 330, Wellington 1. - Nov - Zelando.

ESPERANTO-KONGRESO EN LA ARKTIKO

Norvegujo estas longa lando. Tial bedaŭrinde ĉiam multaj samideanoj devus travojaĝi longan distancon por atingi nian landan kongreson.

Nur malofte ni havis okazon kongresi en la norda parto de la lando. Sed nun la malgranda, sed tre aktiva kaj kuraĝa Esperantoklubo La Norda Lumo en Tromsø invitis al sia urbo la 44-an Norvegan Esperanto-Kongreson, kaj la Liga Estraro danke akceptis, ke la kongreso okazu en Tromsø 5.-6. Julio 1975. La klubo jam vige komencis la preparlaborojn.

Tromsø estas nomata « la pordo al

la Arktika Maro ». Sed ne timu : somere la klimato tute ne estas arktika, la temperaturo povas atingi + 25° C ! Kaj ĉu vi scias, ke kun siaj 2 400 km² Tromsø estas laŭ areo la plej granda urbo de la Nordo ? La loĝantaro proksimiĝas al 50 000. La urbo ankaŭ estas la « ĉefurbo » kaj universitata urbo de Norda Norvegujo.

La naturo kaj la vivformo en Norda Norvegujo estas tute alia, ol en la sudo. La kongreso okazos en la sezono de la noktomeza suno, kiam la suno brilos tage kaj nokte. Kompreneble oni ne riso al Tromsø nur por kelkaj kongresaj tagoj. — La Loka Kongresa Komitato jam preparas diversajn postkongresajn aranĝojn, ekskursojn al la plej vizitindaj lokoj en la ĉirkaŭaĵo, kaj, se anonciĝos sufiĉe da partoprenantoj, oni ankaŭ klopodos aranĝi ekskurson eĉ al la Norda Kabo, la plej norda punkto de Eŭropo.

Esperanto-kongreso apud la Arktika Maro ne estas ĉiutaga evento. Tial oni intencas inviti esperantistojn el la tuta mondo, tiel, ke fariĝos ne nur norvega, sed vere internacia esperantista renkontiĝo. Preparu vin jam nun, aranĝu, ke vi pasigos vian someran libertempon 1975 en la ĉarma, ekzotika nordo. La (provizore) plej norda Esperanto-klubo de la mondo atendas vin kaj faras sian eblon por doni al vi unikajn travivaĵojn.

NEKROLOGO

FRANCIO

Auguste BROISE (1901-1974)

La 12-an de julio 1974, en La Madeleine-NONANCOURT (Eure), pro cerba kongesto, preskaŭ subite mortis

Auguste BROISE, emerita inĝeniero pri ŝoseoj kaj pontoj, kaj gvidanto de la Terminologia Centro de Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE).

Naskiĝinte la 29-an de oktobro 1901 en AULT (Somme) li ofte translo-

kiĝos tra la tuta Francio. Unue, en Bretonio, kie en liceo de Lorient la 16-jara junulo ricevas abituriantan diplomon pri filozofio. Pro la tiamaj cirkonstancoj (en 1917) li devas tuj labori kiel helpa imposto-kolektisto en Vannes (Morbihan), kie li intera-



lie eklernas la bretonan lingvon; poste, kiel projekto-desegnisto ĉe la armeaj servoj en La Courtine (Creuse), kie li ekster-dejore studas cele trapasi la ekzamenon por fariĝi inĝeniero pri ŝoseoj kaj pontoj.

Ekde 1927, li estas inĝeniero sinsekve en diversaj departementoj, kaj fine en la regiono de Brézolles (Eure-et-Loir), kie li emeritiĝas en 1966.

Jam en 1925, li interesiĝis pri diversaj lingvoj, inkluzive de Esperanto; sed, nur en 1945, li povos dediĉi pli da tempo al ĉi tiu ŝatata okupo. Bedaŭrinde liaj junaj lernantoj ne persistis, kaj tial, de tiam, Auguste Broise individue laboris por Esperanto. En 1958, li finis la verkadon de sia «Teknika Terminaro pri ŝoseoj kaj pontoj», eldonita en 1959 de U.E.A.

En 1971, li anstataŭis D-ron Haferkorn, kiel gvidanto de la Terminologia Centro de ISAE. Tiam, li kun-ordigas la penojn de pluraj kunlaborantoj, sed li precipe korektas multajn verkojn: de la simplaj esprimoj pri sportoj ĝis la teknikaj-sciencaj tradukoj destinitaj al la Slipa Vortaro de S-ro Eichholz (Kanado).

Auguste BROISE studis plurajn lingvojn, kaj, el ili, li kapablis skribi aŭ paroli almenaŭ kvar. Krome, li pasiĝis por la matematikoj kaj la arkeologio.

Kar-memora kaj ne-forgesebla restos ĉi tiu eminenta samideano, malalta laŭ la statur, sed granda laŭ la kapableco senlace labori por nia nobla afero, precipe por perfektigi la teknik-an-sciencan vortaron.

A. Blondeaux.

ITALIO

Lucia TERRAZZANI — La koro de S-ino Lucia TERRAZZANI ĉesis bati la 17-an de aprilo en Verona.

Ŝi naskiĝis en Pirano d'Istria, sub la suvereneco de Jugoslavio, la 1-an de aprilo 1886-a. Do ŝi de kelkaj tagoj fariĝis 88-jaraĝa.

Ŝi, kvankam instruistino, de longe estis membro de la Itala I.F.E.F.-Sekcio, kaj ofte partoprenis en niaj kongresoj. Ĉiam en la unua vico kun sia notlibreto ŝi estis karakteriza kaj verva figuro de niaj kongresoj kaj renkontiĝoj.

S-ino Terrazzani aliĝis ankaŭ al la 26-a IFEF-Kongreso en Tarragono, sed kiam ni telefonis al Verona por akordiĝi por la vojaĝo al Hispanio, ni eksciis pri ŝia subita forpaso.

Ŝi laboris ankaŭ en katolika esperanto-movado, kaj estis sekretariino de la 29-a I.K.U.E.-Kongreso en Romo.

GERMANIO

— En Germanio ni denove perdis fidelan membron.

Anton Vath, Ceflokomitivisto i.R. el Karlsruhe forlasis nin la 2-an de aŭgusto 1974. Kvankam li estis malsana dum longaj jaroj, li ofte partoprenis niajn aranĝojn kaj daŭre interesiĝis pri ĉio en la movado.

Al la edzino ni sincere kondolencas. Ni konservu al li bonan memoron.